der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde im Kulturbund der DDR

14. Jahrgang | Nr. 88 (2/1978) | 30 Pf

La Bazaj Taskoj de Kulturligo

La IX-a Kongreso de Kulturligo septembre 1977 sendube markis novan etapon en la evoluo de la socialisma kultura organizaĵo. En dek Bazaj Taskoj la Kongreso formulis la ĉefajn direktojn de la estonta agado de la 200-milmembra Ligo. La plej multaj el tiuj taskoj, kiel montris ilia pritrakto dum la 4-a CLE-plenkunsido fine de februaro en Halle, rekte rilatas ankaŭ la esperantistojn, malgranda sed aktiva parto de Kulturligo de GDR. Elirante de la kompleksa percepto de tio, kio estas kulturo (1-a baza tasko = bt), KL bazigas sian agadon je la idealoj de la laborista klaso (2-a bt). Plue elformante sian internaciisman agadon KL pledadas por intima amikeco kun Soveta Unio kaj ĉiuj socialismaj landoj kaj plifortigos sian kontraŭimperiisman solidarecon (3-a- bt). Grava bazo kaj daŭre denova objekto de ĝia agado estas la revoluciaj kaj humanismaj kulturaj tradicioj (4-a bt). La organizaĵo speciale akceladas literaturon kaj la artojn (5-a bt) kaj agadas por popularigo de ekkonoj el scienco kaj tekniko mem stimulante sciencan kreivemon (6-a bt). Grava kampo de Kulturligo estas la socialisma rilato al la natura homa medio, por ties flego kaj protekto ĝi multfake efikadas (7-a bt). En la kadro de KL trovas plue lokon plej diversaj interesokampoj, valoraj por la spirita pliriĉiĝo de la civitanoj kaj utilaj al la socio.

Inter tiuj ankaŭ estas menciita Esperanto (8-a bt). Substrekante la gravan rolon de la junularo (9-a bt) Kulturligo akcentas la kunlaboron kun sociaj kaj ŝtataj partneroj kaj samtempe partoprenas en la regado de la ŝtato kiel organizo mandathava de la urba estraro ĝis al la Popola Parlamento (10-a bt). Multaj akcentoj, valoraj por la estonta agado de la esperantistoj, troviĝas en la novaj Bazaj Taskoj. Sed pri tio en unu el la estontaj numeroj.

Detlev Blanke

La Esperanto-movado kaj sciencaj esploroj

— Tezaj konstatoj kaj proponoj —

1. Eliri el objektivaj historiaj procesoj

1.1. Se la movado por internacia lingvo (IL), t. e. en la praktiko nur la Esperanto-movado, volas sukcesi, ĝi devas konsideri en sia strategio kaj taktiko la kondiĉojn kaj faktorojn, kiuj determinas la objektivajn procesojn de la nuntempa internacia evoluo de la homaro. Tiuj i. a. estas:

a) la daŭra pligraviĝo de la influo de la socialisma mondsistemo kaj de aliaj progresemaj kontraŭimperiismaj fortoj
b) la tendenco al malstreĉiĝo kaj paca kunekzistado
c) la scienca teknika revolucio
d) internaciaj tendencoj al integriĝoj (en la socialisma kaj nesocialisma ŝtatgrupoj).

1.2. Ĉiuj procesoj, je kies komenco (!) ni staras kaj kiuj estas ĉiuj kunligitaj inter si objektive kreas principe favorajn kondiĉojn por la solvo de la IL-problemo, kaj per tio por la Esperanto-movado mem. Ĉi-rilate estas interesa simptomo la granda ĉapitro pri lernado de fremdlingvoj en la Fina Akto de Helsinki (kp. GDR-Paco-eldono 1977, p. 33).

1.3. La objektivaj procesoj *ne efikas aŭtomate* por la solvo de la IL-problemaro, nek ĝenerale nek speciale por Esperanto. La proponita solvo (Esperanto) devas prezentiĝi konvinke akceptebla por la mondo

a) pro praktika elproviteco (= la movada kaj ekstermovada aplikoj de Esperanto)
b) pro nerefutebla scienca bazo, kiu pruvas ankaŭ el teoria vidpunkto la optimuman taŭgecon de planlingvo ĝenerale kaj speciale de Esperanto.

2. Interlingvistiko/esperantologio

2.1. Ne povante ĉi-tie detale motivigi mian koncepton, mi komprenas interlingvistikon kiel lingvistikan disciplinon, kiu esploras ĉiujn demandojn kaj problemojn de la internacia lingva komunikado kun ĉiuj ĝiaj politikaj, ekonomiaj, lingvosciencaj kaj aliaj aspektoj. Interlingvistiko havas la taskon — *speciale konsiderante la planlingvojn* — montri la vojon al laŭeble *plej efika kaj racia solvo de la problemo de internacia lingva komunicado.*

2.2. Grava branĉo de interlingvistiko (sed ne identa kun ĝi) estas esperantologio, la lingvoscienco kiu *esploras la fontojn, strukturon, evoluon kaj komunikadajn potencojn* de Esperanto. Sur la bazo de la normiga sistemdokumentaro de Esperanto (Fundamento de Esperanto) kaj kongrue kun la ŝanĝiĝantaj komunikadaj bezonoj de la internacia parolantaro la esperantologio ankaŭ devas ellabori la *principojn por la laŭplana konscia pluevoluigado* de Esperanto. Esperantologio do estas deskriptiva kaj preskriptiva scienco kaj pro tio havas ligon al lingva planado.
En ampleksa kaj riĉe bibliografiita artikolo „Interlinguistik und interlinguistische Forschungen“ (interlingvistiko kaj interlingvistikaj

esploroj), kiu aperis en n-ro 6/1977 de „Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung“ (Berlin-GDR) mi donis superrigardon pri la interlingvistika problemaro.

3. **La internacia situacio rilate al sciencaj esploroj (interlingvistiko, esperantologio)**

3.1. Nur escepte interlingvistiko kaj esperantologio estas oficialaj esplorobjektoj de ŝtataj institucioj (parte en la kadro de Soveta Akademio de Sciencoj, en la universitato de Budapest, en la Centro por esploro kaj projektado de objektivigitaj instru- kaj lernmetodoj Paderborn, FRG).

3.2. Sekve preskaŭ ne ekzistas profesiaj sciencistoj, kiuj kontinue entreprenas sciencajn esplorojn pri IL kaj Esperanto.

3.3. Ekzistas nur malmultaj nacilingvaj fakverkoj sur scienca nivelo pri IL[1]).

3.4. La relative malmultaj (sed plimultiĝantaj) interlingvistike laborantaj specialistoj plej ofte agas eksterprofesie, inter si nur nesufiĉe kontaktas kaj nekontentige informas unu la alian. Labordivido kaj racie stirata esplorado ankoraŭ ne ekzistas.

3.5. Mankas marksisme-leninisme validaj ampleksaj sciencaj verkoj pri la diversaj aspektoj de la problemo de internacia lingva komunikado (kp. punkton 4).

3.6. Mankas aŭ ne sufiĉas validaj sciencaj verkoj, sufiĉe priskribantaj laŭ modernaj (ne modernismaj!) vidpunktoj la *strukturon, evoluon* kaj la *komunikadajn potencojn* de Esperanto (= esperantologio).

3.7. Mankas klara koncepto, ĉu entute konscie gvidi, kaj se jes, kiel gvidi la evoluon de Esperanto. Tio povas havi danĝerajn sekvojn.

3.8. **Jam el tio sekvas: Neesperantistaj decidinstancoj, kiuj devus iam decidi pri Esperanto**

— aktuale ne estas sufiĉe informitaj pri IL-problemo ĝenerale kaj speciale pri Esperanto,

3.9. — kaj do se ili devus decidi ekzistas neniu garantio, ke ili nepre kaj aŭtomate sin esprimus favore por Esperanto.

4. **Kaŭzoj por la situacio, skizita sub 3**
Ekzistas objektivaj kaj subjektivaj kaŭzoj.

4.1. **Objektivaj kaŭzoj:**

4.1.1. La internacia stato de la produktivaj fortoj (se ni parolas pri la industrie altevoluintaj landoj) ankoraŭ ne atingis tian nivelon, ke la daŭre pliakriĝanta lingva problemo jam signifus senpere percepteblan fortan bremsadon de la progreso kaj fariĝus neeltenebla. *Ankoraŭ* la teknikaj kaj homaj rimedoj sufiĉas (kvankam en daŭre malpli bona grado kaj kun altiĝantaj kostoj kaj komplikiĝantaj politikaj kaj aliaj problemoj) por venki la lingvan barieron.

4.1.2. Inter la multaj gravegaj internacie solvendaj problemoj (paco, malarmado, gardo de la homa medio, alfabetigo, nutraĵo por ĉiuj k. t. p.) la lingva problemo *ankoraŭ* ne rangas inter la plej urĝaj, kiujn necesas solvi en plej proksima tempo.

4.2. Subjektivaj kaŭzoj

4.2.1. La internacia esperanto-movado estas ĉefe orientita pragmatike (tio estas esence prava, ĉar gravas la praktika elproviteco de la lingvo kaj la praktikaj porhomaj servoj per ĝi).

4.2.2. Flanke de la plej multaj gvidantaroj de la internaciaj kaj naciaj Esperanto-organizaĵoj mankas sufiĉa kompreno pri la rolo de la scienco por la solvo de la lingva problemo. Oni ne sufiĉe konsideras, ke la scienco fariĝis produktiva forto kun daŭre kreskanta signifo por la socio. Neniuj gravaj aferoj estas progresigeblaj sen scienco. La scienco ne trovis adekvatan al la nuntempa mondo lokon en la strategio kaj taktiko de la movado. Tamen lastatempe ekz. en UEA estas observeblaj esperigaj ŝanĝoj.

4.2.3. La „venko" de Esperanto ĝenerale estas konceptata tro mekanisme kaj simplisme. Oni ignoras la fakton, ke enkonduko de IL ververe estas ekstreme komplika kaj malfacilega proceso (pro i. a. politikaj, ekonomiaj k. aliaj kaŭzoj). Krom tio oni ne havas klaran koncepton, en kia grado kaj kien oni povus kaj devus enkonduki internacian planlingvon. Anstataŭ scii oni ofte kutimas profeti.

4.2.4. La etburĝa aŭ sekteca karaktero de iuj partoj (por ne ĝeneraligi) de la Esperanto-movado, ofte malhelpis al sciencistoj dum la jardekoj engaĝi sin por la problemo de IL ĝenerale kaj speciale pri Esperanto. Malprave oni identigis la principan IL-problemon kun iuj trajtoj de la IL-movado. Ĉi-rilate mi ŝatus citi trafajn partojn el la provizora raporto de la aganta direktoro de CED, prof. d-ro J. Pool („La estonteco de CED", 20. marto 1975, p. 3): Ili (la esperantistoj) ĝenerale supozas, ke ili mem scias tion, kion oni devas scii pri la lingvoproblemo kaj ĝia solvo; ili konceptas la taskon jene: doni tiun scion al la mondo. Tiu konceptiĝo estas natura en iu ajn movado.
Ĝi estas des pli komprenebla ĉe ni, ĉar la gvidantoj de la Esperanto-movado dum jaroj instigis ĝin per retorikado pri la „perfekteco" de Esperanto, kies supereco kiel solvo de „la" monda lingvo-problemo estas nekontestebla „fakto", kiun aliaj „ignoras", „misprezentas" aŭ kaŝas per „blufoj". Tiu sinteno de la gvidantoj certe komfortigis plurajn esperantistojn, sed kontribuis al la naiva kredo inter ili pri la simpleco de la lingvo-problemo kaj de ties solvo.
Unu sekvo de ĉi tio estis preskaŭ kompleta dispartiĝo . . . inter esperantistoj kaj ekspertoj. Ekspertoj en lingvaj fakoj ne interesiĝis multe pri Esperanto, parte (oni devas supozi) ĉar esperantistoj kutime prezentis ĝin kiel aferon tro simplan por esti ineresa kaj esperantistoj ne fariĝis mem ekspertoj en tiaj fakoj, kun maloftaj esceptoj. Ili atendis, ke la homoj kun fakaj kapabloj malkovru Esperanton, anstataŭ ke la homoj, kiuj malkovris Esperanton, akiru fakajn kapablojn."
Tamen, Pool daŭrigis (p. 10) „Lastatempe spertoj ankaŭ montris, ke kiam fakuloj renkontas esperantistojn, kiuj vere scias, pri kio ili parolas, la fakuloj ofte montras novan, bonvenigan interesiĝon pri la temo Esperanto". Tiu konstato estas ankaŭ tre klare pruvebla per faktoj el Germana Demokratia Respubliko.

4.2.5. Mistikismaj teorioj, subkonscie aŭ malkaŝe ankoraŭ regantaj en la lingvoscienco kondukis al subtakso de la planlingva problemo (i. a. lingva darvinismo ek de Schleicher) aŭ al supertakso (General

semantics en internideaj vestoj, aliaj idealismaj lingvofilozofiaj teorioj aperantaj plej diversforme, i. a. ĉe la naturalisma skolo).

5. **Kion fari por ŝanĝi la situacion?**

5.1. **Apliki la dialektikon inter teorio kaj praktiko**

5.1.1. La internacia Esperanto-movado kaj la naciaj movadoj devas repripensi sian strategion kaj taktikon.
Tio ne signifas, rezigni pri la ĝis nun taŭgaj kaj pravaj pruviĝintaj agaddirektoj: nome apliki, disvastigi kaj kulturi Esperanton.

5.1.2. Necesas aldoni al la agado *sciencan komponenton*, por ke entute povas funkcii la *dialektiko inter teorio kaj praktiko:*

a) La praktika movado estas la bazo por sciencaj konstatoj kaj konkludoj. Vera scienco devas deiri de faktoj. *Do la praktiko efikas al la scienco.*

b) La praktiko profitas el sciencaj konkludoj (pliprestiĝo de la movado), kaj ricevas gravajn stimulojn kaj impulsojn de la scienco.
Do la scienco efikas al la praktiko.

(Pri tio oni, cetere, povas lerni jam ĉe E. Drezen, kiu vidis kaj aplikis *unuecon* inter teoria kaj praktika agadoj inter politika kaj faka aktivecoj. Ĉi-rilate la soveta kaj kelkaj laboristaj Esperanto-movadoj, i. a. la germana fine de la dudekaj komence de la tridekaj jaroj, montris interesajn trajtojn.)

5.2. **Kiel procedi en nacia skalo?**
La sekvaj paŝoj ne nepre devas sekvi mekanike unu post la alia, sed realiĝas ofte samtempe:

5.2.1. La Landa Organizaĵo (LO) serioze kaj kontinue okupiĝu pri la loko de la scienco, pri la dialektiko inter teorio kaj praktiko en sia Esperanta agado.

5.2.2. LO eduku la membrojn al tiu dialektika pensado, informu ilin konstante pri la sciencaj aspektoj de la IL-problemo ĝenerale kaj speciale pri Esperanto por anstataŭi naivan kredon per scio.

5.2.3. LO celtrafe serĉu science interesitajn kaj kapablajn membrojn kaj interesigu ilin pri la sciencaj aspektoj de la IL-problemaro (interlingvistiko) kaj speciale pri Esperanto (esperantologio).

5.2.44. LO fondu „Esplorgrupon pri interlingvistiko/esperantologio ĉe . . ." (aŭ „fakgrupo", „problemgrupo pri la monda lingvoproblemo/la problemo de internacia lingvo" k. t. p.).

5.2.5. Tiu esplorgrupo:

a) organizu regule kolokvojn pri interlingvistikaj kaj esperantologiaj temoj por interna scienca kvalifikiĝo de la membroj de la grupo

b) organizu kolokvojn pri interlingvistiko kaj esperantologio por neesperantistaj sciencistaj rondoj. Temoj povus esti i. a.:
- „Internacia lingva komunikado kaj ĝiaj nuntempaj aspektoj"
- „Klopodoj solvi la internacian lingvan problemon kaj la scienca prijuĝo de tiuj klopodoj"
- „Planlingvoj kaj internacia komunikado" (spertoj, speciale de Esperanto)
- „Fontoj, strukturo, evoluo kaj komunikadaj potencoj de Esperanto"
- „La valoro de planlingvoj por la ĝenerala lingvistiko"

- „La valoro de planlingva instruado por la lernado de naciaj lingvoj“
- „La Esperanto-movado en pasinteco kaj nuno — socia mikromodelo“
- „Klerigaj kaj edukaj valoroj de Esperanto-instruado“
- „Objektoj de interlingvistiko kaj esperantologio“
  k. t. p.

(Oni unue ofertu superrigardajn, do resumajn prelegojn)

c) garantiu nepre la sciencan nivelon de la prelegoj *kaj de la aŭskultantaro* (!)

d) entreprenu, laŭeble, proprajn esplorojn kaj publikigu ilin en *nacilingvaj* sciencaj revuoj aŭ libroj kaj krome verku superrigardajn sciencajn studojn por nacilingvaj revuoj, por popularigi la faktojn jam pli malpli konatajn inter interlingvistikaj kaj esperantologiaj rondoj (kp. la temojn sub 5.2.5.b, 5.3.)

5.2.6. LO klopodu altiri al tiu esplorgrupo ankaŭ pli kaj pli da neesperantistaj sciencistoj pro plialtigi la sciencan nivelon kaj la prestiĝon de la grupo.

5.2.7. LO klopodu ligi la esplorgrupon al iu nacia prestiĝa scienca institucio (ekz. filologia societo, universitato, akademio k. s.).

5.2.8. LO do instigu, helpe de sia esplorgrupo, *profesiigi* la esplorojn pri interlingvistiko/esperantologio, tamen certigante, ke estu garantiata la ĝusta atento pri la veraj faktoj kaj atingoj de Esperanto (por eviti rediskuton kaj pridubon de jam klaraj aferoj, ekz., ke Esperanto funkcias k. t. p.).

5.2.9. LO internaciigu la agadon de la esplorgrupo (kunlaboro kun alilandaj esplorgrupoj, kun *internaciaj* instancoj kiel Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) k. t. p.).

5.3. Kelkaj esplortemoj kaj sciencaj projektoj

5.3.1. Interlingvistikaj temoj

- La rolo de la internacia lingva komunikado en la evoluo de la produktivaj fortoj (historia aspekto)
- Scienc-teknika revolucio kaj la internacia lingva komunikado
- Revolucia monda proceso kaj la lingva aspekto
- Politikaj, ekonomiaj, juraj, psikologiaj kaj klasaj aspektoj de la nuntempa apliko de kelkaj etno-lingvoj kiel internaciaj komunikiloj
- Eblecoj de raciigo de la internacia lingva komunikado — historiaj spertoj kaj perspektivoj
- Socialismo kaj samrajteco de lingvoj (Leninisma lingvopolitiko en internacia kompreno)
- La problemo de internacia planlingvo en teorio kaj praktiko
- Lingvoscienco kaj planlingvoj, la kazo de Esperanto: internacia lingvistika eksperimento
- La konscia influo de la homo je la evoluo de la naciaj lingvoj (planiteco kaj spontaneco en lingvoj)

- Scienca valoro de la okupiĝo pri planlingvoj
- Objektoj kaj metodoj de interlingvistiko
- Bibliografio pri interlingvistika literaturo de la komencoj ĝis la nuntempo.

5.3.2. **Esperanto-rilataj kaj esperantologiaj temoj**
(elekto)

- Fontoj de Esperanto
- Strukturo de Esperanto (ankaŭ kompare al etnaj lingvoj)
- Evoluo de Esperanto
- Komunikadaj potencoj de Esperanto (ankaŭ kompare al etnaj lingvoj en la rolo de internaciaj komunikiloj)
- Fakterminoj en Esperanto (Esperanto kiel lingvo por la scienco)
- Influo de naciaj lingvoj je Esperanto
- Sinonimoj en Esperanto
- Idiomatiĝo en Esperanto
- Eblecoj kaj limoj de lingva planado en Esperanto (i. a. pri la rolo de la Akademio)
- Historio de la internacia kaj de la naciaj Esperanto-movadoj (speciale: Historio de la internacia kaj naciaj proletaj Esperanto-movadoj)
- Esperanto — instrumento en la klasa batalo de la laboristaro
- La internacia Esperanto-movado — socia mikromodelo (i. a. sociologia esploro de la Esperanto-movado)
- La lingvaj kaj nelingvaj (eksterlingvaj) kaŭzoj de la relativa sukceso de Esperanto
- Klerigaj kaj edukaj potencoj de la instruado de Esperanto
- Propedeŭtika valoro de Esperanto-instruado por la lernado de
- aliaj fremdlingvoj
- Instruoj el la lingvistika monda eksperimento Esperanto por la lingvoscienco kaj lingvofilozofio
- Bibliografio de la esperantologia literaturo
- Bibliografio de la publikaĵoj en Esperanto (parta daŭrigo de la bibliografio de Petro Stojan[2]) ĝis la nuntempo)

La menciitaj temoj estas nur kelkaj, kiujn oni devas sisteme kaj altnivele prilabori. Kompreneble, ne eblas solvi tion per la modestaj fortoj de la Esperanto-movado. Nur ampleksa profesiigo de la esplorado de interlingvistiko kaj esperantologio en nacia kaj internacia skaloj kondukos al kontentigaj rezultoj. Mi menciis tiom vastajn problemojn por indiki la dimension de la solvendaj taskoj.

---

1) Ĉiujn plej gravajn indikojn oni trovas en mia germanlingva studo „Zur wissenschaftlichen Beschäftigung mit Plansprachen", en: Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung", Berlin (GDR), parto I en 2/77, parto II en 4/77

2) Kp. „der esperantist" n-ro 71 (3/75) p. 16—17

[redacted]

Die Fachgruppe Interlinguistik/Esperantologie beim Zentralen Arbeitskreis Esperanto, unter Leitung von Prof. Dr. Falkenhahn, leistet eine wertvolle Arbeit. In „der esperantist" Nr. 43, 57/58 (Januar—Mai 1973), S. 19, 30—31 berichteten wir ausführlicher über ihre Tätigkeit. Eine Reihe von wichtigen und grundlegenden deutschsprachigen Veröffentlichungen in der DDR wurden durch die Fachgruppe angeregt (vgl. „der esperantist" Nr. 84 (4/1977), S. 14/15 sowie V. Falkenhahn in „der esperantist" 18/19 (S. 3 ff und 59/60, S. 10 ff).

Auf ihren letzten Sitzungen beschäftigte sich die Fachgruppe mit dem internationalen Stand der wissenschaftlichen Forschung zum Esperanto (am 27. 11. 1976) sowie mit Fragen der elektronischen Sprachdatenverarbeitung und ihren Beziehungen zur Plansprachenproblematik (am 14. 5. 1977).

Alle Esperantisten, die über eine wissenschaftliche Ausbildung verfügen und Interesse an wissenschaftlicher Arbeit zu Fragen der Interlinguistik und Esperantologie haben, werden gebeten, sich beim Zentralen Arbeitskreis Esperanto zu melden. (Vgl. diese Nummer S. 2—7!)

★

Esperanto por kibernetiko!

Ni prenas el la soveta scienca revuo „Kibernetiko" 1/95 (1977), Moskva, informon pri kibernetika kongreso. G. G. Vorobjev k. a. skribas pri „Kelkaj aktualaj problemoj de kibernetiko (laŭ materialoj de la Internacia Kongreso en Namus, en la jaro 1976)", tie oni legas sur paĝo 3: „. . . sur tiu kongreso oni rimarkis konsiderindan plialtiĝon de la nombro de partoprenantoj el Usono kaj el Anglio. Al Namur aparte multaj specialistoj venis el la Federacia Respubliko Germanio. Tio instigis la sekretariaron de la kongreso certigi, ke kelkaj prelegoj kaj diskutkontribuoj estu tradukitaj germanen. Laŭ iniciato de la okcidentgermanaj sciencistoj oni akceptis Esperanton kiel samrajtan laborlingvon dum la kongreso, rekomendante al la referontoj por la estonto, prezenti ilustritan materialon en tiu lingvo."

★

Aeronaŭtikaj terminoj

S-ano Jan Pospišil, estro de la laborgrupo por aeronaŭtika terminaro kadre de Sciencteknika Sekcio de Ĉeha Esperanto-Asocio aperigis malfermitan leteron por samideanoj-samfakuloj en duonmonata multobligita cirkulero AVIO.

En la unua numero de tiu ĉi periodaĵo li publikigas ankaŭ adresaron de pilotoj kaj aeronaŭtikistoj, interesiĝantaj pri terminologia laboro.

El la 2-a numero de „Avio" evidentiĝas, ke la laborgrupo planas kompili dum unu jaro *mil-vortan aeronaŭtikan terminaron* en formo de sliparo, surbaze de Ĉehoslovaka Ŝtata Normo („CSN 31 0001 — Letecké názvoslovi").

Interesiĝantoj skribu al: s-ano Karl Franc, Dukla 2287, CS - 530 02 Pardubice.

El la novjara mesaĝo de la prezidanto de U. E. A. 1978

La plej bona karakterizo de la celoj de la Esperanto-movado venis en 1977 ne de parolanto de la Internacia Lingvo sed de eksterulo: „Estas samtempe . . . respekto al la kulturaj diversecoj kaj . . . deziro je internacia alproksimiĝo, kiuj motivas vin.“ Per tiuj vortoj la koncerna parolanto ĝuste komprenigis, ke la Internacia Lingvo kapablus samtempe ŝirmi la kulturojn kontraŭ la atencoj de la grandaj lingvoj kaj ebligi rektan komunikadon inter diverslingvanoj. Ĝi do samtempe apartigus (por konservi la kulturajn valorojn) kaj kunigus (por akceli la senperajn kontaktojn).

La parolanto estis s-ro Amadou-Mahtar M'Bow, Ĝenerala Direktoro de Unesko. La okazo de lia parolado estis la Universala Kongreso de Esperanto. Neniam antaŭe tiel eminenta funkciulo de internacia organizaĵo gastis en unu el niaj internaciaj kongresoj.

Tiujn vortojn aŭdis kaj eĥis alia ĉeestanto en la inaŭguro de nia kongreso, la islanda ŝtatprezidanto, s-ro Kristján Eldjárn. Nur malofte en la pasinteco partoprenis nian kongreson ŝtatprezidanto.

La nunaj estas eksterordinaraj tagoj por Esperanto. Entute, la jaro de la naŭdeka datreveno de Esperanto estis eksterordinara jaro.

Sed ni ne perdu nian ekvilibron. Okazis iom similaj sukcesoj en pasinteco. Pensu nur pri la periodo 1923--24. Senprecedence granda Universala Kongreso, favora rezolucio de la Franca Akademio de Sciencoj, granda komerca konferenco pri Esperanto, debatoj en la Ligo de Nacioj . . . Ĉio ĉi konvinkis multajn homojn, ke la venko jam alproksimiĝas, ke nur necesas atendi ĝin. Pensu nur pri 1954, kiam Unesko, sub lerta premo de profesoro Lapenna kaj liaj helpantoj, rezoluciis rekone al la kontribuo de Esperanto al la proksimigo de la popoloj de la mondo.

Ni povas demandi nin kial je tiuj pli fruaj okazoj la sopirata rapida disvastiĝo de Esperanto ne okazis. Eble la politikaj kondiĉoj ne estis maturaj, eble niaj organizaĵoj ne estis sufiĉe fortaj por ekspluati la ŝanĝiĝantajn kondiĉojn, eble mankis unueco inter la laborantoj, aŭ mankis la volo fine kaj definitive antaŭenigi la aferon.

Nun denove ni staras ĉe tiu jam vizitita sojlo. Antaŭe ni ne sukcesis transpaŝi ĝin, retroirante denove, perdinte fidon, konfuziĝinte pri la vojo, laciĝinte.

Ĉi-foje ni ne permesu retroiron. Jen ŝtatestroj subtenas nin: ni uzu tiun subtenon por turni aliajn niadirekten. Jen ekzistas bona volo en internaciaj organizaĵoj: ni utiligu ĝin. Jen ordinaraj popolanoj lernas la Internacian Lingvon: ni semu similajn semojn en aliaj eble fekundaj landoj. Necesas *ĝeneraligi* niajn jamajn atingojn, *internaciigi* la sukcesojn en la unuopaj landoj, kaj *konstrui novajn sukcesojn sur la jam atingitajn.*

Kaj kiel ni sukcesu, se la optimistoj de 1924 malvenkis? Ĉar ni posedas multajn avantaĝojn, kiujn ne posedis niaj antaŭuloj .Unue, ni laboras por matura lingvo — pruveble pli fleksebla kaj pli profunda ol tiu de 1924. Due, ni laboras per fleksebla kaj unueca Asocio. Trie, tiu Asocio estas

Pli proksima kunlaboro kun UNESKO

Dankletero de s-ro M'Bow

Post la Universala Kongreso de Esperanto en Islando, la prezidanto de UEA ricevis du dankleterojn de la ĝenerala direktoro de UNESKO, sinjoro Amadou-Mahtar M'Bow.

En la unua letero (dato 1977-09-07), li dankas pro la aranĝo en Islando kaj plue skribas: „Mi multe ĝuis nian tre interesan kaj stimulan diskuton, kaj mi estas konvinkita, ke ekzistas tre bonaj ebloj por pli proksima kunlaboro inter via Asocio kaj UNESKO en la estonteco. Kun miaj reesprimitaj dankoj kaj personaj salutoj."

La letero de 1977-09-12 estas dankesprimo al la mesaĝo de UEA direktita al UNESKO por ĝia 30-jara jubileo. En tiu letero, s-ro M'Bow diras: „Bonvolu permesi, ke mi kaptu tiun ĉi okazon por ankoraŭfoje esprimi mian profundan dankon pro la afablaj vortoj, kiujn enhavis via mesaĝo kaj kiuj estas por nia Sekretariejo kaj mi mem fonto de granda kuraĝigo kaj plia indiko pri la bonvenaj subteno kaj kunlaboro, kiun via Asocio ĉiam disponigis al UNESKO kaj ties celoj en la hodiaŭa mondo."

Rezolucio de aŭstria KP

Por rezolucio, kiun submetis aŭstraj komunistoj al la 23a aŭstria Komunistpartia Kongreso fine de 1977 favore al Esperanto, voĉdonis de 246 partikongresaj delegitoj 223 por, 13 kontraŭ, 10 ne voĉdonis.

(Laŭ „Internaciisto", 1/78)

Wörterbuch Deutsch—Esperanto

Nach einer Information des Enzyklopädie-Verlages Leipzig erscheint die 2. Auflage des Wörterbuches Deutsch—Esperanto von E.-D. Krause erst Ende des Jahres 1978.

---

finance kaj administre solida, dank' al la ŝparoj kaj plifortiĝoj de la pasintaj tri jaroj. Kvare, kaj ĉefe, ni laboras en mondo, kiu, kvankam ankoraŭ longe for de tiaj atingoj, tamen komencas kompreni la valoron (aŭ, pli precize, la neceson) de harmonia kunvivado en spirito de reciproka komprenemo. Unu el la necesaj kondiĉoj de tiu komprenemo estas, aŭ devas esti, taŭgaj lingvaj rimedoj. Naciaj lingvoj eble povas helpi, sed nur Esperanto povas liveri tiun duoblan garantion, kiun aludis s-ro M'Bow, nome la garantion de kultura diverseco kaj internacia kompreniĝo. Ni posedas la rimedojn. La kondiĉoj estas maturaj. Do, la vojo estas malferma kaj la sojlo trapasebla. Ĉu ni kuraĝe antaŭeniros aŭ time hezitemos? Ĉi-foje ni ne hezitu. Ni prenu per ambaŭ manoj la defion de 1978. La vojon al la ĝenerala utiligo de Esperanto ni firme kaj definitive malfermu.

Sukceson al ĉiu nia membro, al ĉiu laboranto por la Internacia Lingvo, en la jaro 1978!

Humphrey Tonkin

V. Samodaj

Aldone al la disputo Blanke - Ojalo - Ĥarkovskij

(Kp „de“ 87)

Mi tre ne ŝatas paroli, des pli — artikoli. Sed la rebato de k-do Ĥarkovskij devigis min esprimi mian personan opinion pri la temo. Ĉar mi ne konsentas kun la ideoj, esprimitaj en la rebato kaj mi subtenas la pruvojn de k-do Blanke.

Kio estas Esperanto? Esperanto estas lingvo.

Kio estas lingvo? „Lingvo estas plej grava rimedo (ilo) de la homa interkomunikado“.

Ĉu vi memoras? Ri-me-do!

Esperanto (kiel rimedo) ne naskas internaciistojn, sed la internaciisma sento igas homojn serĉi rimedon por interkompreno, igas ilin lerni Esperanton, kiu estas tre taŭga ligilo por internaciistoj-diverslingvanoj. Sed multaj, eĉ sciante pri ĝia ekzisto, bonege efektivigas siajn internaciismajn ligojn pere de aliaj lingvoj-iloj, ofte eĉ ne bezonas Esperanton. Esperanto mondskale ludas dume tre mizeran internacian rolon kompare kun pluraj lingvoj naciaj.

Esperanto mem ne portas ideojn. Ilin portas homoj, kiuj utiligas Esperanton por apliko de tiuj ideoj kaj erare opinias, ke ne ili mem estas la ide-portantoj, sed la lingvo. Kaj tiuj opinioj povas naski la konkludon: sekve Esperanto enhavas la „internan ideon“ kaj infektas per ĝi la homojn, kiuj fariĝas „iloj“ por tiun ideon transporti?

Ĉu tiel necesas kompreni vin, k-do Ĥarkovskij?

Certe, kompari Esperanton kun la naciaj lingvoj ne eblas. Pli ĝuste — kompari eblas, nur egaligi ne eblas. Ĉar Esperanto kaj la naciaj lingvoj havas tute malsamajn rolojn. Eblus diri, ke la lingvoj naciaj ofte, preskaŭ ĉiam, dividas homojn, kaj Esperanto ilin kunligas. Estus pli ĝuste diri, ke helpas-malhelpas kunligon-dividon de homoj ne la lingvoj mem, sed scio-nescio de tiuj lingvoj. Tamen, ĉu ne okazas ofte, ke komuna lingvo ne povas kunligi malsamideanojn samnaciajn? Ĉu ne okazas ofte, ke malsamlingvanojn kunligas komunaj ideoj, eĉ sentoj, kaj nur poste sekvas trovo de komuna lingvo, la ilo-rimedo, la helpilo por pli intima samideaniĝo? Ĉu ne okazas, ke komuna lingvo eĉ malproksimigas homojn, kiam ili komencas kompreni (pere de la lingvo!), ke iliaj ideoj malsamas?

Mi ne volas nuligi, eĉ ne malgrandigi la internaciisman rolon de Esperanto. Ĝi estas granda, ĝi povus esti kolosa, sed tio venos, kiam la nesufiĉa uzado de internacia helplingvo en la senbride kreskanta diverskampa kaj diversnivela kunagado de la homaro igos erupcii la konservativecon de la socia opinio pri roloj de la naciaj kaj la internacia lingvoj, devigos homojn ŝanĝi siajn misopiniojn. Kaj tiun erupcion devas prepari ni, — la internaciistoj armitaj per la mirinda interkomprenilo — Esperanto, libera de naciisma rezervemo tiom kara por la lingvoj naciaj.

Tion ni povas fari ne per nebulvorta propagando pri la „interna ideo“ de Esperanto, sed per konkreta kaj ĉiuflanka aplikado de Esperanto en porpaca agado, en scienco, en literaturo (tradukado pli ol verkado, ĉar la tradukado vere internaciigas la naciajn kulturperlojn), en turismo, en sporto, en teatro kaj kinofilmoj, en duflankaj kaj multflankaj asocioj de amikeco, en ligoj inter ĝemel-urboj k. t. p., k. t. p. . . . Nur tio allogos neesperantistajn rondojn, kiuj dume tro kredas la ĉiopovan kunligan rolon de fremdaj lingvoj. Nur nerefuteblaj palpeblaj rezultoj kredigos la nekredulojn.

Konklude mi denove asertas: nur la homoj estas portantoj de la demokratiismo, internaciismo kaj ĉiuj aliaj noblaj kaj nenoblaj ideoj. Esperanto estas kaj ĉiam restos nur taŭga *rimedo kaj ilo* por tiujn ideojn apliki.

Letero el Rumanio

Estimata samideano Blanke!

Kiam mi legis en la 5-a n-ro „de“ 1976 (73) de la revuo, aparte valora por mi, „der esperantist“, la opinion de s-ro Jaan Ojalo rilate iujn el viaj asertoj pri „Esperanto en perspektivo“, mi tuj konsentis ke li perfekte pravas. Sed legante iom poste sur la sekvantaj du paĝoj de la sama revuo vian respondon, la premada logiko de viaj argumentoj faris min dubeme ŝanceliĝi, kiel en konata anekdoto pri la juĝo de la reĝo Salomono:

Aŭskultante unue la reklamaciinton, tiu tiel lerte pledis por sia afero, ke la saĝa reĝo tuj pravigis lin. Siaflanke, la denuncita defendis sin tiel fervore kaj konvinkeble, ke la reĝo, post mallonga pensado, devis pravigi ankaŭ lin.

Tiam, la unua privata konsilisto, kiu asistis ĉe juĝo, klinis sin al la orelo de la reĝo kaj flustris:

— Tre klera mastro, ne eblas ke ambaŭ estu pravaj. Sed la saĝa reĝo, post momenta penso, turnis sin al la maljuna konsilisto kaj diris, karesante sian barbon:

— Ankaŭ vi pravas!

Revenante al nia afero, tiel same mi povas diri: ankaŭ vi pravas, samideano Blanke. Ĉirkaŭ ni staras amaso da homoj, kiuj ne juste taksas Esperanton pro diversaj motivoj, kiujn ni senĉese venkobatas laŭ nia kapablo kaj fervoro. Sed kiam ili akuzas nin pro kosmopolitismo, ni plej taŭge refutas tian malĝustaĵon, sciencargumentante ke la lingvo ne havas klaskarakteron, ke ĝi do ne estas ideologio. Kaj tamen, mi ne povas aserti ke Esperanto estas simpla komunikilo kaj ke nur kiel tia la esperantistoj el tuta mondo oferas sian tempon, menskapablon kaj materiajn rimedojn, lernante kaj senĉese perfektiĝante sian scipovon de tia aparta lingvo.

Unue ni devas distingi la lingvon de la movado. Certe la lingvo ne estas ideologio, sed la movado, vole-nevole, havas ian, kaj, spite ĝian neŭ-

tralecon, oni ne povas nei ke la Esperanto-movado, pli ol kiu ajn movado aŭ organizo, respondas al la humanismaj celoj kiel internaciismo, humanismo, internacia solidareco kaj amikeco, t. e. ĝuste tion kion Zamenhof atendis de sia Esperanto, kiu, kvankam nur komunikilo, tiel trafe ebligas la plenumon de tiaj noblaj celoj. Certe ankaŭ aliaj movadoj kontribuas al la bona interkompreniĝo de la popoloj, sed la Esperanto-movado superas ĉiujn kvalite kaj ĝuste tial la plej kleraj kaj la plej progresemaj homoj subtenas ĝin senhezite. Pro la fakto ke iuj esperantistoj interbatalis dum la milito, Esperanto ne kulpas, samkiel la marksismo ne kulpas ke iuj komunistoj ne bone komprenas la aliajn. Pro tio kulpas, laŭ mia opinio, la troa diseriĝo de nia mondo en dekoj kaj dekoj da suverenaj-sendependaj ŝtatoj kun celoj pli aŭ malpli diverĝaj, ĝuste nun, kiam, laŭ la objektivaj leĝoj de la etna memdisvolviĝo de la homaro, ni troviĝas en transira periodo al pli kaj plia interdependeco de la popoloj, kiu nepre postulas iom post iom regrupiĝon per federaciiĝo de la diseriĝinta mondo. Sed, kiel vi bone diris, tio estas materialo por aparta artikolo.

Cetere mi tute akordiĝas kun la karakterizo: La ideologia strukturo de Esperanto movado estas mikromodelo de la tutmondo, kaj kun la konkludo de viaj respondoj.

Prof. Toma Macovei, Rumanio

★

4-a kunsido de CLE

La 4-a kunsido de CLE (post la elektoj de 1976) okazis la 25an kaj 26an de februaro ĉijare en Halle. La membroj elektis unuanime kiel novan prezidanton Rudolf Hahlbohm.

Oni i. a. prenis jenajn decidojn rilate al la kongresoj:

1. Reprezentos CLE dum la 63a UK en Varna la membroj de la prezidio Rudolf Hahlbohm, d-ro Detlev Blanke, Hans Heinel, Siegfried Linke, Werner Pfennig.

2. Reprezentos la Junularan Komisionon de CLE dum la 34a TEJO-Kongreso Jürgen Hamann, Michael Lennartz, Renate Lewin.

La partoprenantoj i. a. pritraktis la signifon de la novaj Bazaj Taskoj de Kulturligo por la esperantistaro. traktis la laborplanojn de la Distriktaj Laborrondoj por 1978, diskutis la programon de la XI-a Konsultiĝo de la Esperanto-organizaĵoj de eŭropaj socialismaj landoj en Proprad kaj fiksis, ke la III-a Centra Renkontiĝo de la esperantistoj en Kulturligo de GDR okazu ĉi-jare en Rostock.

CLE krome ektraktis sisteme pri la problemoj de la publikeca agado, kiu inkluzivas la interdistingendajn varbadon kaj informadon.

Okaze de la 80-a naskiĝjubileo de Bertolt Brecht 1978

Solidarkanto

Ek, popoloj de ĉi tero!
Konsentiĝu tiel jam:
Ke ĝi via nun en vero —
Nutru vin per riĉa man'.

Antaŭen kaj ne forgesu,
Ke forte staras kolegar'!
Ĉe helpo ne forrestu,
Antaŭen ne forgesu
Pri nia solidar'!

Vi de ajna haŭtkoloro!
Ne kunhelpu en buĉad'!
Kiam sonos via horo —
Baldaŭ paŝos frat' kun frat'. *Antaŭen . . .*

Ke plej baldaŭ ni sukcesu
Ni bezonos vin kaj vin,
Hom' la homon ne forgesu —
Tiel ĉiu helpas sin. *Antaŭen . . .*

Majstroj, kiuj ajn, intrigas.
Ŝatas en malpaco nin.
Kaj dum ili nin disigas
Restos mastroj ĝis la fin'. *Antaŭen . . .*

De la mondo proletaro
Konsentiĝu pro liber'.
Via forta taĉmentaro
Metos finon al mizer'!

Antaŭen, kaj ne forgesu,
Sin konkretigas la demand'
Ĉe helpo ne forrestu:
Kies la estonto estas?
Kies mond' estas, mond'?

Trad. hero

Pri laborista Esperanto-movado

W. Glier, W. Weißbach (†), A. Möller, M. Conrad: Zur Geschichte der Arbeiter-Esperanto-Bewegung im Bezirk Erzgebirge-Vogtland (1907—1933), Kulturbund der DDR, Bezirksleitung Karl-Marx-Stadt 1976, 40 Seiten (Pri la historio de la Laborista Esperanto-movado en la distrikto Ercmontaro/Vogtlando (1907—1933)

Tiu malgranda broŝuro, eldonita honore al la 30-a datreveno de la fondiĝo de Socialisma Unuiĝinta Partio de Germanio estas rezulto de skrupula teritoria esplorlaboro de la kvaropa aŭtoraro. Post la prezento de celo kaj bazaj taskoj de la esperantistoj en Kulturligo de GDR kaj konciza superrigardo pri la nuntempa signifo de Esperanto (p. 4—9) sekvas ĉapitroj pri „Esperanto kaj la laborista movado (p. 9—12). Utiligante dokumentojn, gazetinformojn kaj personajn rememorojn la aŭtoroj priskribas la aktivadon de la germanaj laboristaj esperantistoj en la industria centro ĉirkaŭ Chemnitz (hodiaŭ Karl-Marx-Stadt) antaŭ la unua mondmilito kaj post la milito ĝis 1933 (p. 12—18). Estas klare montritaj la intimaj rilatoj inter la Laborista Esperanto-movado kaj la ĝenerala germana laborista movado kun ĉiuj problemoj kaj skismoj. De speciala signifo por la germanaj laboristoj estis la konstruado de forta amikeco al la juna soveta ŝtato. Ankaŭ la ercmontaraj laboristaj esperantistoj havis multajn korespondrilatojn al USSR kaj provizis la maldekstran germanan gazetaron per informoj pri la vivo de la laboristoj en Sovetunio (p. 19—26). Konkursoj (p. 27—28) kaj ekspozicioj (p. 28—29) organizitaj de germanaj kaj sovetaj esperantistoj helpis al la pliprofundiĝo de la rilatoj. Valoraj ankaŭ estas la ĉapitroj pritraktantaj la batalon de la laboristaj esperantistoj je la laborista unueca fronto (p. 30—31) kaj la agado de ili kiel antifaŝistaj rezisto-batalantoj (p. 32—35). Pri la antifaŝista ilegala agado de la esperantistoj ankoraŭ mankas multe da materialo.

Escepte de la historiisto d-ro Willi Glier, kiu ĉefredaktis la kajeron, la aliaj tri aŭtoroj senpere travivis la priskribitan historion. La verketo do estas serioza kontribuo kaj al la esploro de la teritoria laboristmovada historio kaj al tiu de la laborista Esperanto-movado. Estus salutinde se sekvus similaj materialoj. La broŝuro estas ricevebla ĉe ĈLE (1 marko).

D. B.

★

Al la iamaj membroj de LEA!

Centra Laborrondo organizas la 15an de junio 1978 en Berlin kunvenon de la iamaj membroj de Germana Laborista Esperanto-Asocio, loĝantaj hodiaŭ sur la teritorio de GDR.

La kunveno celas

a) prezenti kaj diskutigi skizon de verkota libro pri la historio de la laborista Esperanto-movado

b) pridiskuti eblecojn kaj vojojn por daŭre gardi kaj utiligi la tradiciojn de la laborista Esperanto-movado por la nuntempa agado de la esperantisto de GDR.

La kostojn portos CLE. Ĉiuj eks-LEA-anoj, interesitaj je partopreno, bv. senprokraste sin anonci ĉe CLE.

Laborplano 1977/1978/1979 Leningrad-Dresden

inter la Kulturligo de GDR, Dresden, Distrikta Laborrondo Esperanto kaj la Esperanto-Komisiono ĉe Leningrada Filio de la Unio de amikec-societoj de USSR (SSOD)

Okaze de la vizito de la prezidanto de la Esperanto-Komisiono k-do prof. S. N. Podkaminer en Dresdeno, oktobro 1977, interkonsentas la subskribantoj laŭ la Amikec-kontrakto pri la jeno:

1. Ambaŭ organizaĵoj intencas plifirmigi la kulturajn kontaktojn inter Dresdeno kaj Leningrado per helpo krom de la rusa kaj la germana lingvoj ankaŭ de la internacia lingvo Esperanto. Por tiuj ĉi celoj ili aplikos la sekvantajn formojn de kunagado:
   a) interŝanĝi materialojn kaj informojn pri defendo de naturo kaj konservo de historiaj monumentoj kaj konstruaĵoj
   b) helpi la kontakton inter diversaj amatoraj kulturaj grupoj, ekz. fotoamatoraj, filatelistaj, popolart-laboraj, akvarianaj k. t. p.
2. Organizi grupon de Dresdenaj esperantistoj el 20—25 personoj por veturo al Leningrado en la jaro 1978.
3. Organizi grupon de Leningradaj esperantistoj el 20—25 personoj por veturo al Dresdeno en la jaro 1979.
4. Helpi la individuajn reciprokajn vizitojn de ambaŭurbaj esperantistoj laŭ personaj invitoj.
5. Instigi la kolektivan kaj individuan korespondadon de esperantistoj laŭ profesioj kaj interesoj. Kvarfojo dumjare aperigi en „Dresdena Informilo“ sciigojn pri kulturaranĝoj en Dresdeno kaj Leningrado. La Esperanto-amikoj en Leningrado sendos artikolojn pri Leningrado. En la „Informilo“ estos aperigataj korespondadresoj de ambaŭurbaj esperantistoj kun indiko de aĝo, profesio kaj interesoj.

Distrikta Laborrondo Esperanto
Dresdeno

Walter Röhner
prezidanto

Esperanto-Komisiono ĉe Leningrada
Filio de la Unio de Amikec-societoj
de USSR (SSOD)
S. N. Podkaminer
prezidanto

Dresdeno, la 31an de oktobro 1977

★

Ausstellungsexponat

Johannes Dittrich aus Roßwein hat seit Jahren freundschaftliche Verbindungen mit Esperantisten aus Tichvin bei Leningrad. Diese Beziehungen führten zu einem Austausch von Plakaten und Kinderzeichnungen zwischen den Partnern, die sowohl in Städten der UdSSR als auch in Roßwein gezeigt wurden.

Aus sowjetischen Materialien fertigte J. Dittrich ein Ausstellungsobjekt an, das aus 24 Kinderzeichnungen aus Tichvin besteht. Diese Zeichnungen, die von Fachleuten als „künstlerisch wertvoll“ beurteilt wurden, können entliehen werden. Interessenten mögen sich wenden an: Johannes Dittrich, 7304 Roßwein, Bergstraße 4.

Se vi legos unue la unuan kaj poste la kvaran literon de supre malsupren, vi ricevos la nomon de mallonga skribaĵo de Zamenhof:

1. malligita
2. senmonta pejzaĝo
3. nenio ĉirkaŭita de io
4. ekzercaĵo en la muziko
5. parolado, prelego
6. muzika instrumento en la preĝejo
7. malpeza konstrumaterialo
8. baraĵo ĉirkaŭ malnovaj urboj
9. montri emon al io
10. presaĵo aŭ aĵo kiun oni legas
11. aro da arboj
12. somera floro
13. aparta
14. alkoholaĵo

KHS

*

Solvo de la krucvortenigmo el n-ro 85, p. 23 de H. Rothe[1])

Horizontale: 1. laboratorio / 7. multa / 9. aorto / 11. orgojla / 13. orda 15. obeu / 17. por / 19. omo / 21. ina / 23. anas / 24. boli 25. alo / 26. salat / 27. teror

Vertikale: 1. lampiono / 2. balo / 3. reag / 4. tiaj / 5. rura / 6. oportuna 8. troa / 10. oleo / 12. oazo / 14. dron / 16. bril / 17. pasat 18. rabot / 20. mala / 22. nito

[1]) En „der esperantist“ n-ro 85 ni erare nomis kiel aŭtoron s-ron Ŝtanura. Ni petas pardonon.

*

Eĉ tio ekzistas!

Je la lasta mateno — dum la reveturado al la flughaveno — nia gvidantino rakontis, ke en Rejkjaviko hundoj estas malpermesitaj, ke oni trinkmonon nek donas nek prenas.

La duono de la infanoj estas naskitaj ne-edzece, kaj eksterlandanoj, kiuj postlasas tian „memoraĵon“, eĉ estas deziratai. Sekve de tio Henry, mia akompananto, rimarkis triste:

„La plej bonajn aferojn oni ĉiam ekscias, kiam estas tro malfrue. “

(Laŭ „Islanda Saga“ en Gisela May, „Mit meinen Augen“, Berlin 77)

(Sendis Erich Seidemann)

★

Bonan apetiton

Dekkvar tagojn bezonis la franco Michel Lolito por formanĝi sian biciklon. Antaŭe li dissegis ĝin en partojn 3—4 mm grandajn. Plej glate la manĝegulo glutis la ĉenon, la pneŭmogu matiko ne tro bongustis. Tamen la biciklo estis nur kvazaŭ antaŭmanĝaĵo. Baldaŭ la rekordemulo volas frandi aŭtomobilon.

El letero de Kostarikano

Estimataj gesamideanoj:

De Kostariko en Meza Ameriko ricevu niajn korajn kaj varmajn salutojn.

Eble por vi, nia lando estas tute nekonata, kaj ĉi-tiu letereto surprizós ĉiujn aŭ almenaŭ kelkajn el vi, ĉu ne?

Bone, la kialo de nia skribado al vi estas ke „ĉe ni la movado iom post iom komencas kreski, kaj ni intencas organizi eksponadon pri la praktika uzado de Esperanto, okaze de la naŭdeka datreveno de la aperigo de la unua Esperanta lernolibro Do, ni pensas ke helpe de broŝuroj, afiŝoj: turismaj, komercaj, kulturaj, politikaj, religiaj, k. t. p. propaganda ni montros la praktikan uzadon de E—o.

Se tiun eksponadon ni realigos, ni havos eblecon uzi la televidon kaj nian kulturan afiŝfakon, kiu publikigas ĉiutage en la pligravaj ĵurnaloj, la eksponado okazos en grava halo, eble ĉe ia ministrejo. Kombreneble, por ni estus bonege montri pri via lando, ĉar ĉe ni oni malmulte scias pri vi. Bone, ni finas atendante vian bonvenan helpon.

Je la nomo de la kostarikanaj geesperantistoj, kun antaŭdankoj.

Nia adreso: Poŝtkesto 2128
San José-Kostariko
Meza Ameriko

Carlos Salazar

*

Scienca seminario en Žilina

„Apliko de Esperanto en la scienco kaj tekniko“ estas la temo de internacia seminario, kiu okazos la 7-an kaj 8-an de oktobro 1978 en Žilina, organizata de la Domo de la Sindikatoj kaj la Sciencteknikaj Sekcioj de AESSR kaj ČEA.

Estas antaŭvidataj prelegoj pri jenaj temoj:

A. Esperanto kiel scienc-teknika lingvo
   - terminologio
   - sciencteknika informado
   - ĝisnunaj spertoj pri apliko

B. Fakaj prelegoj
   - popularsciencaj
   - sciencaj
   - inĝenieraj
   - altlernejaj

La prelegtemojn anoncu ĝis la fino de aprilo, la manuskriptojn necesos sendi ĝis la fino de majo. En majo estos eldonita detala preleg-programo de la seminario.

La limdato por la akcepto de aliĝiloj de partoprenontoj — neprelegontoj estas la fino de aŭgusto.

Eksterlandanoj pagos por unu tranokto 60 Kĉs post sia alveno. Pli longan restadon en Žilina mendu pli frue.

La aliĝilojn kaj pagojn sendu al: Inĝ. Vladimir Nêmec, Hliny 722 A, 010 01 Žilina, ČSSR.

Radio Moskvo en Esperanto

Kun agrabla surprizo multaj esperantistoj eksciis pri la esperantlingvaj disaŭdigoj de Radio Moskvo. La 4-an kaj 5-an de februaro en la kadro de la itallingva programo la moskva stacio parolis ĉirkaŭ 15 minutojn en la internacia lingvo. Oni interalie respondis demandojn de italaj esperantistoj. Paroladis la veterano de la sovetunia Esperanto-movado kaj de MEM, prof. S. N. Podkaminer el Leningrad pri la historio kaj nuntempo de la sovetunia movado. Plue oni eksciis, ke Esperanto ludos rolon dum la Olimpiaj Ludoj 1980 en Moskvo kaj ke eldoniĝis la nova Sovetunia Konstitucio ankaŭ en Esperanto. La itala parolisto, kiu cetere enkonduke informis, kio estas Esperanto, dum la disaŭdigo kelkfoje menciis (en la itala) „parolas Radio Moskvo en la internacia lingvo Esperanto".

Ni esperu pri pluaj disaŭdigoj, ĉar ili sendube kontribuos al la diskonigo de faktoj pri Sovetunio.

★

Esperanto en Radio

La Esperanto-Redakcio de Radio Varsovio elsendis en la leterkesto de la programo de 19. kaj 20. 1. 1978 la statistikon por la jaro 1977. La redakcio ricevis dum la tuta jaro 4865 korespondaĵojn. 923 korespondaĵoj venis el nia Germana Demokratia Respubliko. (Plej multajn korespondaĵojn sendis Trude kaj Paul Thomas, Auerbach; sekvas Werner Pfennig, Neubrandenburg, Elsa Gruhle kaj Margarete Löwe, Leipzig, kaj Hella Sauerbrey, Berlin. En la vico de la landoj post la Germana Demokratia Respubliko sekvas Sovetunio 824, Federacia Respubliko Germanio 751, ĈSSR, Hungario, Britujo, Francio, Finnlando kaj Nederlando 119 korespondaĵoj.)

Paul Thomas

★

Unika travivaĵo

Esperanto-rondeto ĉe Domo de Kulturo en Ústi nad Labem kaj Esperanto-klubo ĉe Sindikata Uzina Klubo Bonex en Teplice – lokaj grupoj de ĈEA aranĝis en la tagoj 5a kaj 6a de nov. renkontiĝon omaĝe al la 60a datreveno de la Oktobra Revolucio kun kultura programo. La invitilo sobre anoncis relative buntan programon, kies kulmino estis la sabatvespera premiero de dramo de André Guelma „La lokomotivo Jean kaj mi", prezentota de unusola aktorino. La interpretantino estis la fama esperantista dram-artistino Eva Seemannová el Prago, la fondintino de la teatra ensemblo „Verda ĉaro de Julio Baghy". 129 minutoj de pura ludotempo, kiun dividis nur 15-minuta paŭzo, estis streĉa kaj profunde emocia, vere unika spektaklo, kie Eva Seemannová montriĝis kiel granda artistino. Resume, artisma travivaĵo, kiun oni apenaŭ kredus ebla.

(Starto 6/77)

Rimarko de la red.:

Ni prenis la informon el „Starto" por atentigi, ke s-ino Seemannova ankaŭ pretas ludi dum esperantistaj aranĝoj en GDR. Interesuloj sin turnu al Ĉeha Esperanto-Asocio, CS - 110 00 Praha 1, Jilska 10.

[redacted]

Der Zentrale Arbeitskreis Esperanto führt 1978 folgende Seminare durch:

1. Internationales interlinguistisches Seminar zum Thema „Wissenschaftliche Aspekte des Esperanto", 17.–23. April in Ahrenshoop.
2. Jugendseminar, vom 22.–26. 5. 1978 in Wehsendahl bei Straußberg.
3. Methodikseminar, vom 9.–12. 11. 1978 in Bad Saarow.
   (Fälschlich in „de" 1/78 als Jugendseminar angekündigt)
4. Jugendseminar, vom 20.–24. 11. 1978 in Wehsendahl.
5. 12. Seminar für ehrenamtliche Leitungskader, vom 27. 11–3. 12. 1978 in Wehsendahl.

Die Teilnahme an den Seminaren ist kostenlos. Interessenten, die die Zustimmung des Bezirksarbeitskreises benötigen, können sich beim Zentralen Arbeitskreis melden. (108 Berlin, Charlottenstraße 60)

Serĉas kontakton kun GDR-grupo

La tre aktiva Esperantista Klubo el Dospat (ĉe Smoljan) volonte ligos amikecajn rilatojn kun GDR-grupo. Skribu al Emil Ĉirpanski, okr. Smoljanski, 4831 Dospat, Bulgario.

PRIPERSONAĴOJ

Ni gratulas

– La iama membro de CLE, la meritplena laborista esperantisto Richard Rabenalt el Rathenow festis la 22-an de januaro 1978 sian 75-an naskiĝtagon. Postdate niajn plej korajn gratulojn!
– Fariĝis 75-jara la multaktiva esperantisto Erich Seidemann el Dresden, la 22-an de majo.

Ni kondolencas

– Mortis la 30-an de decembro 1977 k-do Fritz Becker en Parchim.

Prospekto el ĈSSR

Bele presitan kaj riĉe ilustritan prospekton pri Česká Třebová (25 p.) mendu ĉe Zavodni Klub Železničařu Esperantský Kroužek, Česká Třebová, Ĉeĥoslovakio.

Regule en gazetara bulteno

Dum nur malmultaj monatoj pli ol okfoje en la oficiala gazetara bulteno „Scienco, tekniko kaj klerigo", eldonata de Allgemeiner Deutscher Nachrichtendienst (ADN), Berlin, aperis informoj pri Esperanto, i. a. pri la 62a UK, la Trigroŝa Romano, filmoj en Esperanto, „Scienca Mondo", Radio Moskvo en Esperanto k. t. p.

En stenografia fakĵurnalo

La scienca fakĵurnalo por stenografio kaj maŝinskribado „Theorie und Praxis", eldonita de la Societo por Stenografio kaj Maŝinskribado de GDR, publikigis en n-ro 2/1977 (p. 46–50) artikolon de Otto Möller pri la adapto de la germana stenografio al Esperanto. La tekston ilustras multaj stenografiaj ekzemploj. Interesitoj sin turnu al la redakcio 104 Berlin, Lienstraße 138, aŭ al Otto Möller, 563 Heilbad Heiligenstadt, Heinrich-Rau-Straße 1.

[redacted]

aŭ

La mondo ridas . . .

Mi estas la plej granda . . .
La historio pri plej freŝdataj „e–pm“

En okcidentaj landoj oni nuntempe propagandas kaj vendas kontraŭ sufiĉe alta sumo t. n. „Esperanto-poŝtmarkojn“ de FUJEIRA. Mi rigardis la serion helpe de „verda lupeo“ kaj trovis la jenon: Temas pri faksimiloj de neaperintaj poŝtmarkoj. Lau iu famo tiu serio estis planita por eldono en la jaro 1974 pere de iu komercisto en Bejrut. „Feliĉe kaj hazarde“ unu provpreso „trovis vojon“ al Danlando. Tie troviĝis nun fervora kaj vigla samideano kiu opiniis, ke tiun pm-serion devas koni la tuta mondo. Li do iris al la presejo Mogens Larsen bogtryk kaj presigis dumil foliojn. Por pli interese aranĝi la tuton, aperis „dua eldono“ pro mendo de „alia komercisto“. Centmil ekzemplerojn!! Kompreneble nun la „unua eldono“ kun nur dumil estas de alta valoro. Nia fervora kaj vigla samideano en Danlando tamen opiniis, ke mankas ankoraŭ la saŭco. Hazarde li vizitis la presejon, kaj tute hazarde tie trovis 80 (okdek) provpresojn de la „dua eldono“ de la faksimiloj en eĉ kvar diversaj koloroj. Kaj tiuj 80 memkompreneble verŝajne estas la pinto de ĉio ĝis nun okazinta sur la teritorio de la Esperanto-filatelio. 80 provpresoj de faksimilaj represoj de neaperintaj pm.
La tuta serio konsistas el ses bildoj: Zamenhof (15 dirhamoj), Hodler (35 dirhamoj) kaj Lapenna (50 dirhamoj) $15 + 35 = ?$, La Sankta Biblio (1 rialo), La Nobla Korano (2 rialoj) kaj Retoriko de Lapenna (3 rialoj) $1 + 2 = ?$

La bildo de Lapenna klare eldiras „la prezidanto de UEA“, ni povas tion kredi, ĉar la poŝtministro de FUJEIRA ja devas scii tion. Mi proponas, sendi amase dankleterojn al la poŝta ministerio de FUJEIRA pro la planita pm-serio.

Tiuj stultaj filatelistoj, kiuj ne volas akcepti raregajn presprovojn de faksimiloj de ne aperintaj pm, aŭ faksimilojn en unua aŭ dua eldono en siaj kolektoj tamen ne malesperu: la ekipo ĉirkaŭ tiu brava iniciatoro ne levis la manojn supren (la dekstran malfermitan antaŭen jes). Senlace ili daŭrigis la laboron kaj laŭdire konvinkis la poŝtan ministerion de OMAR, ke ili nun eldonu tiun serion. Kompreneble Lapenna sur la markoj ankoraŭ estas prezidanto de UEA. *Max Meier*

★

Malhelpita fajrobrigado

Dejorante ĉe la strato Abano-Padua (Italio) la relgardisto Mario Zampi rimarkis proksime brulantan fojnejon. Li alarmis la fajrobrigadon kaj poste kun estingilo kuris al la brulejo por fari sian plej eblan. La fajrobrigadon li tamen ekspektis vane. Antaŭ forlasi sian postenon li laŭ ordono estis ferminta la barilon; do la fajrobrigada veturilo ne povis trapasi.

Esperanto-turismo 1978

N: Nomo de la aranĝo
O: Organizanto de la aranĝo
K: Korespondadreso
P: Prezo
A: Aliĝdato
JA: Junulara aranĝo

1 **Junio 1.—4. Bydgoszcz/Pollando**
N: Internacia E-Renkonto „Bydgoszcz '78 / O: Filio de PEA en Bydgoszcz kaj „Juventur" / K: „Juventur", Jagiellonska 12, PL-85-067 Bydgoszcz / A: majo 1.

2 **Junio 2.—16. Nesebar/Bulgario**
N: Nigramara Esperanto-Feriado / OK: Distrikta Komitato de HEA, pk. 30, Smoljan

3 **Junio 4.—7. Torun/Pollando**
N: Etnografia Renkonto / 12 EPT / O: Etnografia Muzeo kaj Filio de PEA en Torun / K: „Juventur", Jagiellonska 12, PL-85-067 Bydoszcz / A: majo 1.

4 **Junio 4.—11. Bydgoszcz—Funka—Gdansk—Koszalin/Pollando**
N: Internacia Buslinio „Esperanto-78" / 13-EPF / O: „Juventur" kaj BTK de HEA / K: „Juventur", Jagiellonska 12, PL-85-067 Bydgoszcz / A: majo 15.

5 **Junio 16.—30. Nesebar/Bulgario**
N: Nigramara Esperanto-Feriado / OK: Distrikta Komitato de BEA, pk. 30, Smoljan

6 **Junio 17.—27. Budapest—Krakow—Bydgoszcz—Funka—Gdansk—Koszalin—Katowice—Budapest/Hungario—Pollando**
N: Internacia Buslinio „Esperanto-78 / 4-EPL / O: BTK de HEA kaj „Juventur" / K: BTK de HEA, H-1443 Budapest, pf. 153

7 **Junio 22.—29. Znin/Pollando**
N: Internacia E-Feriado por Popollernejanoj / O: Pola Esperanto Junularo kaj „Juventur" / K: „Juventur", Jagiellonska 12, PL-85-067 Bydgoszcz / A: junio 10.

8 **Junio 29.—julio 6. Tuczno/Pollando**
N: Internacia E-Feriado por Popollernejanoj / O: Pola Esperanto-Junularo kaj „Juventur" / K: „Juventur", Jagiellonska 12, PL-85-067 Bydgoszcz / A: junio 10.

9 **Julio Zanka apud Balatono/Hungario**
N: 11-a Pionira Internacia Tendaro / PIT / OK: Teritoria Komitato de HEA, H-7601 Pécs, pf. 2

10 **Julio 1.—20. Bydgoszcz/Pollando**
N: Internacia Kurso por Esperanto-Instruistoj / O: Instituto por Edukado de Instruistoj kaj PEA / K: „Juventur", Jagiellonska 12, PL-85-067 Bydgoszcz / A: junio 10.

11 **Julio 2.—8. Gyula/Hungario**
N: 16-a Somera Esperanto-Universitato / SEU / OK: TIT-SEU, H-5701 Gyula, 48-as tér. 11

12 **Julio 2.—23. Wronczyn—Pobiedziska/Pollando**
N: Internacia Skolta Tendaro „AGORA" / O: Skolta Esperanto-Klubo ĉe II Liceo en Poznán / K: P. R. Janowczyk, Hibnera 6A/4, PL-60-224 Poznán / P: nur sendeviza interŝanĝo / JA: Gejunuloj 14—19 jaraj

13 **Julio 3.—20. Aŭgustova Lagaro/Pollando**
N: 3-a Internacia Skolta Esperanto-Tendaro / O: Skolta Vojevodia Komando Suwalki / K: Kom. Chor. ZHP, 22 Lipca 7, PL-16-400 Suwalki / A: marto 31.

14 **Julio 2.—23. Wronczyn—Pobiedziska/Pollando**
N: Internacia Skolta Tendaro „AGORA“ / O: Skolta Esperanto-Klubo ĉe II Liceo en Poznán / K: P. R. Janowczyk, Hibnera 6A/4, PL-60-224 Poznán / P: nur sendeviza interŝanĝo / JA: Gejunuloj 14—19 jaraj

15 **Julio 3.—20. Aŭgustova Lagaro/Pollando**
N: 3-a Internacia Skolta Esperanto-Tendaro / O: Skolta Vojevodia Komando en Suwalki / K: Kom. Chor. ZHP, 22 Lipca 7, PL-16-400 Suwalki / A: marto 31.

16 **Julio 6.—13. Swiecie/Pollando**
N: Internacia E-Feriado por Mezlernejanoj / O: Pola Esperanto-Junularo kaj „Juventur“ / K: „Juventur“, Jagiellonska 12, PL-85-067 Bydgoszcz / A: junio 15.

17 **Julio 9.—22. Košicke Hamre/Ĉeĥoslovakio**
N: Somera E-Lernejo Košice / SELKO-78 / O: AESSR / K: inĝ. M. Zvara, Leninovo nabr. 29, ĈS-05801 Proprad

18 **Julio 13.—20. Janikowo/Pollando**
N: Internacia E-Feriado por Mezlernejanoj O: Pola Esperanto-Junularo kaj „Juventur“ / K: „Juventur“, Jagiellonska 12, PL-85-067 Bydgoszcz / A: junio 20.

19 **Aŭgusto 6.—15. Nowy Sacz/Pollando**
N: Konferenco de ILEI / O: ILEI kaj Pola Esperanto-Asocio / K: ILEI O. Olssen, Bantorget 3, S-22229 Lund / Rimarko: En Bulgario, ĈSSR, GDR, Hungario kaj Pollando aliĝojn akceptas landaj asocioj.

20 **Aŭgusto 12.—18. Slovaka Paradizo/Ĉeĥoslovakio**
N: Turisma Semajno / TUSE-78 / O: AESSR / K: inĝ. M. Zvara, Leninova nabr. 29, ĈS-05801 Proprad

21 **Aŭgusto 15.—21. Budapest/Hungario**
N: 7-a Varia Internacia Semajno / VIS / OK: BTK de HEA, H-1443 Budapest, pf. 153 / A: julio 15.

22 **Aŭgusto 15.—29. Wladyslawowo/Pollando**
N: Somera Esperanto-Lernejo / O: „Juventur“ kaj AESSR / K: „Juventur“, Jagiellonska 12, PL-85-067 Bydgoszcz / A: julio 15.

23 **Aŭgusto 20.—27. Horni Plana ĉe Lipno/ĈSSR**
N: Turisma Feriado de Esperantistoj / OK: Esp. Rondeto „La ponto“ ĉe klubo „Jitex“, 397 11 Pisek / P: 20 kĉs potage (nur tranokto)

24 **Septembro 1.—15. Nesebar/Bulgario**
N: Nigramara Esperanto-Feriado / OK: Distrikta Komitato de BEA, pk. 30, Smoljan

25 **Septembro 3.—16. Miedzygórze/Pollando**
N: XV. Internacia E-Feriado „Ora Pola Aŭtuno“ / O: Filio de Pola Esperanto-Asocio en Wroclaw / K: „Juventur“, Jagiellonska 12, PL-85-067 Bydgoszcz / A: julio 15.

26 **Novembro 27.—decembro 3. Warszawa—Torun—Bydgoszcz—Zakopane/Pollando**
N: IV. Internacia Foiro de Esperanto-Turismo / O: Monda Turismo, „Juventur“ kaj Centro de Turismo de Pola Esperanto-Asocio / K: „Juventur“, Jagiellonska 12, PL-85-067 Bydgoszcz A: novembro 1.

27 **Decembro 27.—januaro 2. Budapest/Hungario**
N: 8-a Vintra Esperantista Feriado / VEF / OK: BTK de HEA, H-1443 Budapest, pf. 153/Ft. 1700 / A: decembro 1.

[redacted]

[redacted]

Oficisto, 25j., dez. kor. pri turismo, filatelo: Todor Jonev Vasilev, **selo Piperkov ĉiflik,** okrag Kjustendilski

Flegistino, 38j., dez. kor.: Penka Stoeva Kuzmanova, **5000 V. Târnovo**, kv. Colakovli bl. 42, vh. A

Paul Nicoloff, **5000 V. Tirnovo,** ul. 8a Drugina, Nr 4, dez. kor., kol. pm, kol. bk, esp. revuojn k. gazetojn

Ivan Kolev Nedjolkov, str. G. Dimitrov 106, bXB an 32, **Stara Zagora,** 42j., dez. kor., kol. pm. bk, fotojn

Koljo Vetrov **Kanĉev, 5500 Loveĉ,** str. Kiril Metodi 42, dez. kor. pri turismo, literaturo, floroj, kol. pm

Abiturientino dez. kor.: Tinka Slavĉeva, **9850 Preslav,** str. Kozlodni 4

Oficistino dez. kor.: Helena Kuseva, **1680 Sofia - 80,** Kompl. Emil Markov Bl. 251 A

Oficisto, 40j., dez. kor. pri turismo, muziko, kol. bk: Stojan Georgiev, **5100 Gorno-orjohovico,** ul. Tunĝa 24

Instruisto dez kor.: Todor Enreb, **4900 Madan,** str. Moskva bl. 13, an. 41

Janka Avanova Milanova, **7174 v. Borovo,** Rusensko

15—16 jaraĝaj gelernantoj de la lernejo „Mlada gvardija", Klubo „Internacia amikeco", **6300 Haskovo,** str. Lenin 24, dez. kor.

Kosin Neikov, **9000 Varna,** Poste restante, dez. kor.

Lernanto dez. kor.: Jakim Bektaŝev, **4831 Dospat,** distr. Smoljanski, gimnazio

Ljubomir Levičarov, **BG - 1113 Sofia,** Bulvar Lenin, Bloko 83/107-A, dez. interŝanĝi b.k., monerojn, esperantajojn

Kosju Nejkov, **BG - 9000 Varna,** poŝtrestante, dez. kor. pri div. temoj

Seruristo, 28j., dez. kor. p. ĉ. t.: Ali Sabanov, **7300 Kubrat,** str. Vitoŝa 34

Lernantino, 16j., dez. kor. p. ĉ. t.: Ivanička Hristova Ironova, **Razgrad,** str. gecovo P. Eftmič n-ro 31

Lernantino, 16j., dez. kor. p. ĉ. t.: Naĝie Ahmedova Daudova, **7300 Kubrat,** str. Stracin 4

Ljuben Krâstev, str. D. Blagoev 24. **7300 Kubrat,** 26j., dez. kor. p. ĉ. t.

Hristo Genĉev Metev, **5300 Gabrovo,** PK 157, 24j., dez. kor. p. ĉ. t.

Minĉo Dobrv Umĉev, **9300 Talbunin,** str. Lipite 13, 25j., dez. kor. p. ĉ. t.

Petar Nedelĉev Marinov, bul. P. Bezou 22, **Razgrad,** 26j., dez. kor. p. ĉ. t.

Inĝ., 26j., dez kor. p. ĉ. t.: Peter Colof, **Razgrad,** str. Lenin 34

Doktoro, 49j., dez. kor. pri ĉ. t.: Nedko Kânev Gajdarov, str. „Al. Stambolijski" 37, **6280 Gâlâbovo**

Teknikisto, 37j., dez. kor. pri ĉ. t.: Kanjo Mitev Kanev, str. „St. Planina" 12, **6280 Gâlâbovo**

Teknikisto, 28j., dez. kor. pri sporto, kol. bk: Penju Dimov Peev, **6290 Obruĉište,** distr. St. Zagora

Teknikisto, 21j., dez. kor. pri sporto, turismo, kol. bk: Radi Ĵeljazkov Radev, str. „Opâlĉenska" 15, **6280 Gâlâbovo**

Teknikisto, 44j., dez. kor. pri ĉ. t.: Cvjatko Ivanov Cvjatkov, str. „Slavjanska" 36, **6280 Gâlâbovo**

Kursgvidanto serĉas por siaj gekursanoj (20—45j.) korespondantojn. Skribu al: Hristo Dolĉinkov, ul. Dim. Ivanov 7, **Veliko Tirnovo**

Teknikisto, 44j., dez. kor., kol. bk, prospektojn: Ruska Dimova Goĉeva, blok 18, vh. A, ap. 7, **6280 Gâlâbovo**

Teknikistino, 26j., dez. kor. pri ĉ. t.: Veneta Janeva, kv. „Mitju Stanev", **6280 Gâlâbovo**

Herausgeber: Kulturbund der DDR (Zentraler Arbeitskreis Esperanto).

Redaktion: 108 Berlin, Charlottenstr. 60. Fernruf: 2 20 29 91

Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke. Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. - Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. - Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.

Druck: Druckwerkstätte Glauchau

Artikel-Nr. (EDV) 7928 III-12-8 313